# Esperanto en Danio

**30-a jarkolekto • n-ro 1 Februaro 2024**



**Esperanto en Danio**
Membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio
www.esperanto.dk

**Adreso de la prezidanto:**
Peter Wraae
Eremitageparken 6,
2800 Lyngby
☎60 70 79 69 peter@wraae.dk
Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386
UEA-kodo: deaa-t

**Kromaj estraranoj:**
Peter Wraae (Prezidanto DEA)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Finn Østerbæk (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius
Pia Wettergren

**Redakcio kaj aranĝo**
Louise Wangberg kaj Ileana Schrøder.

**Presado:**
Hellbrandt Trykcenter

**Adresŝanĝoj al:**
Finn Østerbæk ☎24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.
Artikoloj por la venonta eldono estos volonte ricevataj ĉe la adreso: eed@esperanto.dk
Limdato por la venonta numero: 1. 05. 2024

## Enhavo

| | |
|---|---|
| Novaĵoj de Danio | 3 |
| DEA Jarraporto 2023 | 4 |
| DEA Jarraporto 2023 | 5 |
| KEK Jarraporto 2023 | 6 |
| KEK Jarraporto 2023 | 7 |
| Aarhus Jarraporto 2023 | 8 |
| Aalborg Jarraporto 2023 | 9 |
| Eŭropa Esperanto-Kongreso | 10 |
| Eŭropa Esperanto-Kongreso | 11 |
| Kalendaro | 12 |
| Jarkunveno de DEA | 13 |
| Jarkunveno de DEA | 14 |
| Jarkunveno de DEA | 15 |
| Jarkunveno de DEA | 16 |
| KEK iam havis propran ejon | 17 |
| Filozofia posteno | 18 |
| Toki Pona | 19 |
| La Afrika Kontinento | 20 |
| Pri Tanzanio | 21 |
| Pri la venonta UK | 22 |
| Krei enhavon por Esperanto | 23 |
| Tago de la Gepatra Lingvo | 24 |
| La papirusoj de Herculeum | 25 |
| Ĉina Novjaroj | 26 |
| Azenaj Oreloj | 27 |
| La Dorso | |

# Novaĵoj pri la revuo


La estraro de DEA diskutis dum la lastaj jaroj, ĉu ni devus ŝanĝi nian dissendan formon el la tradicia fizika formato al la digitala, kaj ni estis kelkaj kiuj plej ŝatis la fizikan revuon. Laŭ ni ĝi havas la avantaĝon ke oni facile povas reveni al pasintaj numeroj kaj relegi artikolojn, informojn pri la renkontiĝoj en KEK aŭ pri niaj jarkunvenoj. Nia celo kompreneble estas servi nia membraro tiel bone kiel eblas, kaj tial ni ĝis nun konservis la fizikan revuon.

Kiam ni konstatis ke PostNord post la jarŝanĝo duobligis la prezon por la elsendado de nia revuo, la estraro de DEA tuj decidis ke estis tempo por iri al la digitala formato. Ni esperas ke vi alkutimiĝos al tio. La revuo estos ankau kiel ĝis nun videbla en nia hejmpaĝo

Ni ankaŭ mrekomendas al niaj membroj fari specialan poŝtkeston en via komputilo kie vi povas konservi kopion de la la revuoj.

Ni retrorigardas kun plezuro pri multaj jaroj kun fizika versio de la revuo kaj antaŭĝojas uzi la novan formaton. ◄

*La estraro de DEA*



# Jarraporto de DEA 2023

**Peter Wraae**

## Heredo kaj donaco

En la jaro 2022 ni ricevis la informon ke DEA heredis 136.000 kr de nia multjara membro Birthe Trærup. La hereda proceso daŭris pli ol duona jaro, kaj komence de 2023 ni ricevis la monon.
Ni tuĵ decidis donaci 20.000 kr al DEJO, kiu antaŭ ne longe ekhavis kasiston.
Tiu ekstra mono donis al ni la eblecon elspezi pli, kaj ni decidis sendi 220 kilogramojn de jam legitaj libroj al la esperanta asocio de Benino, kiu situas en la okcidenta parto de Afriko. La libroj, kiu restis en skatoloj sur la planko de mia vivĉambro dum kelkaj jaroj, estis nia biblioteko kaj malavaraj donacoj el Betty Chatterjee kaj Ana Røssum.

Post iom da serĉado mi trovis transportan firmaon kiu ofertis sendi la librojn al Benino pere de ŝipo, kiu estis la plej malmultekosta solvo. Mi havis bonan kontakton kune kun la prezidanto de la Benina asocio Latifou Gabadamassi kaj li kompreneble feliĉis pro la donaco. Mi proponis al li ke ili povus plidonaci parton de la libroj al la frata asocio en Togolando.

## Reklamilo

Pro nia pli bona ekonomia situacio ni decidis provi enmeti anoncon pri kursoj en Facebuko. Pli ol 13.000 personoj vidis la anoncon, sed bedaŭrinde kun iom magra resulto. Nur kelkaj lernantoj anoncis sin.

## Prelego

Kiam mi serĉis la transportan solvon mi estis en kontakto kun organizo Dansk Afrika Selskab. Kiam ties sekretario audis ke mi estis esperantisto, ŝi invitis min fari prelegon pri nia lingvo en sia asocio.

# Jarraporto de DEA 2023

**Peter Wraae**

### Internacia tago de Esperanto

UEA laboras kadre de UNESCO proklami la 24-an de julio ”Internacia tago de Esperanto”. En tiu proceso estas kompreneble avantaĝo se niaj lokaj naciaj komitatoj subtenas la ideon, por ke oni povu voĉdoni por tuo propono en UNESCO. Mi skribis al la dana UNESCO komitato, sed ne ricevis respondon. Post kelkaj vanaj provoj, mi iĝis obstina kaj sendis al ili fizikan leteron kune kun suplementaj informoj, sed bedaŭrinde ankaŭ vane.

Kiel vi povis legi en nia revuo Esperanto en Danio, ĝi ekhavis novan kunredaktoron. Bonvenon Louise Wangberg, ni estas tre dankema pro via laboro.

### La Kultura Nokto

La Kultura Nokto okazis la 13-an de oktobro kaj allogis multe da junuloj. Ili vigle demandis kaj diskutis nian lingvon, kaj kelkaj interesiĝis lerni Esperanton.

### Zamenhofa festo

Nia Zamenhofa festo okazis la 16-a de decembro en Kulturhuset Pilegården en Brønshøj. Ni kantis kelkajn kantojn kaj feliĉe Hans Christian povis akompani nni pere de lia guitaro, kaj krome li ludis kelkajn proprajn kantojn. Bent kaj Pia faris kvizon kaj estis bona tago kun bona etoso. Mankis al ni Jens kiu tranlokiĝis al Jutlando. ◄

*Peter Wraae, Prezidanto de DEA*

Esperantoforeningen for Danmar
Dana Esperanto-Asocio / DEA

# Jarraporto de KEK 2023

**Bent Jensenius**

Ni kunvenas en Carit Etlars vej 6, Frederiksberg en la kelo.
Ni komencis kiel kutime kun la programo: Rakontu pri via kristnaska ferio kaj pri la pasinta jaro: en la klubo, en Esperantujo kaj en la mondo ĝenerale.
Ŝajnas ke tiu programo estas bona komenco ĉiujare. Bedaurinde la lasta parto (la mondo ĝenerale) montras ke lingvo kiel Esperanto estas bezonata.

La 23an de januaro ni celebris la Ĉinan novjaron, ne nur pro la fakto ke 1/5 de la monda loĝantaro estas ĉinoj, sed precipe ĉar Ĉinio estas granda Esperanto-lando kun sia propra E-muzeo kaj tial ni decidis refari la programon ĉi-jare.

Darya Zelenina prelegis pri ”Naturiĝo de artefarita lingvo: evoluo de Esperanto de Zamenhofo ĝis kovimo”. Tre populara prelego kaj eble la unua kiam ne estis sufiĉe da spaco en nia kuirejo.

Ole Therkelsen prelegis pri kvar mondfamaj danaj fizikistoj: Tycho Brahe, Ole Rømer, H.C. Ørsted, Niels Bohr.

Kiel kutime ni havis budon la 1-an de majo en Fælledparken.La vetero estis bona sed tio bedautinde ne ĉiam estas kutimaĵo.

Jacob Nordfalk prelegis pri artefarita intelekto (AI) - tre grava kaj aktuala temo.

Okaze de la UK en Montrealo ni spektis filmon pri la zamenhofa vizito en Nordameriko. Tiu teatraĵo estis precipe interesa por mi mem, ĉar mi partoprenis en semajna kurso en Herzberg kune kun la ĉefrolulo Gary Evans kiu ludis sinjoron Mann, kiu rakontis pri la vizito de Zamenhof en Novjorko, Vashingtono kaj Montrealo en la jaro 1910.

# Jarraporto de KEK 2023

**Bent Jensenius**

Jacob Nordfalk prelegis denove, ĉi-foje pri Esperanto en la Roskilde Festivalo:
Ĉiujare estas 8-taga Esperanto-renkontiĝo en la Roskilde Festivalo. Ĉirkaŭ 50 volontuloj el la tuta mondo laboras en kaj per Esperanto. La grupo (esperantoholdet) estas tre estimata de la festivalo kaj povas pli-mapli mem elekti kiun taskon ĝi faros, ekzemple gardi enirejon kaj manĝobudon ”Glad Esperanto-Mad”.
La partoprenantoj havas senpagan eniron al la festivalo kaj tio ne nur estas por junuloj. Fakte la pliaĝuloj havas malpli da deĵorhoroj. La teamo en Roskilde bezonas pli da volontuloj. Bonvolu pensi pri tio.

En novembro ni havis muzikvesperon. Hans Christian Frank kantis kelkajn el siaj propraj kantoj esperantlingve kaj Wolfgang presentis la unuan operon origine verkita en Esperanto. La komponisto estas el Ĉeĥio. La aŭskultantoj havis tre diversajn opiniojn pri la kvalito de tiu muzikaĵo.

La lasta KEK aranĝo en la jaro estis nostalgia vojaĝo. Ni vidis kaj diskutis bildojn el la fotoalbumo de Kühlmann. Vere interesaj fotoj ekde 1908 ĝis 1966. Bona bazo por diskutoj.

Ni ankaŭ dum la jaro havis programojn pri Vikipedio kaj paroligaj/babilaj vesperoj. Sendube estas la prelegoj kiuj altiras la plej grandan nombron de partoprenantoj.

Ni finis la jaron kiel kutime kun Zamenhofa festo, la komuna DEA/KEK aranĝo.
Je la fino de la jaro estis 28 membroj de KEK. ◄

*Bent Jensenius, Prezidanto de KEK*

# Jarraporto de Aarhus Esperanto-Klubo

**Tobias S. Nowak**

Jen la jarraporto por la jaro 2023. Stabila jaro. Nia kunvenloko ĉi-jare restis Folkestedet, Carl Blochs Gade 28, 8000 Aarhus C. Ni okazigis niajn monatajn kunvenojn, kiel kutime, tamen mi persone estis aliflanke multe okupita. Jen kio okazis en la pasinta jaro:

En januaro estis nia Ĝenerala kunveno. Grethe kaj Bodil reelektiĝis kaj ni decidis prokrasti ŝanĝojn al membrokotizoj por venonta jaro.
En februaro Bodil kaj Azhar prelegis pri vojaĝo al Pakistano. Parenco de Azhar estis konstruanta novan domon kaj multaj bildoj de tiu procezo estis montritaj
En marto Svend prelegis pri agrikulturaj statistikaĵoj de lia profesia vivo.
En aprilo Mia prelegis pri sia laboro en TEJO kaj UEA por la nova administra sistemo AKSO, kaj la spertoj rilate al tio.
En majo ni ĝuis paroligajn tabloludojn
En la somerferio ni okazigis la someran ekskurson al la pluvarbaro en Randers, kun belaj spertoj kaj poste ni kafeumis en tabloludkafejo.
Post la somerferio la kunveno en septembro havis la programon de rakonti pri somerferiaj travivaĵoj, sed malmultaj venis, do ĉi tiu programero migris al la oktobra kunveno. En kiu, ni aŭdis pri kelkaj buntaj feriaj spertoj.
En novembro ni estis regalita de fotoj kaj rakontoj de Roskilde Festivalo, kie DEJO ĉiu-jare okazigas komunan tendumejon kaj komunan volontuladon. Kelkaj el la membroj de ÅEF partoprenis.
Fine, estis nia Zamenhof- kaj Kristnaskofesto en decembro, kie estis kantado, kukoj kaj glogo.

Por la venonta jaro, 2024, mi strebos denove havi distrajn programojn kaj prelegojn, kaj petas al la aktivaj membroj sinproponi por prelegado ktp. Dankon al ĉiuj kaj bonan novan jaron! ◄

*Tobias Svangtun Nowak, Prezidanto de Aarhus Esperanto-Klubo*

# Jarraporto de Aalborg Klubo

**Ejnar Hjorth**

Bedaŭrinde ne estas io nova pri la situacio en nia klubo por 2023. Sed eta grupo daŭre kunvenas kaj legas kaj diskutas
literaturon en esperanto. Ni ĵus finlegis la libron Robinsono Kruso, kaj nun ni legas artikolojn en Krestomatio de Zamenhof.

Ĉiu jaro ni havas ekspozicion pri esperanto en Aalborghallen. Sed daŭre ne multe da homoj en Danio komprenas la valoron de esperanto. ◄

*Ejnar Hjorth, Prezidanto de Aalborg Klubo*

**ESPERANTO**

**POR MULTLINGVA EŬROPO**

# Eŭropa Esperanto-Kongreso

**Strasburgo, Francio – de la 8a ĝis la 12a de majo 2024**

Por rememori la rolon de Strasburgo en la eŭropa konstruado kaj la humanisma alvokiteco de Esperanto, la temo elektita por ĉi tiu kongreso estas **“Dialogo inter eŭropaj popoloj: portanto de paco”**. Temo kiu ne povus esti pli aktuala.

Esperanto-Strasburgo organizas ankaŭ ĉiusemajne lingvokurson kaj kulturan renkontiĝon ĉiumonate por siaj membroj kaj subtenantoj (koncertoj, konferencoj, bonvenigo de eksterlandaj vizitantoj, vojaĝrakontoj, ktp.) ĉiam en bona etoso. La asocio estas membro de la regiona federacio Esperanto-France-Est kaj de la nacia federacio Esperanto-France. Cele al simpleco kaj ŝparemo, ĝi logike proponas monkontribuon integritan en la 3 strukturojn. ◄

Por aliĝi retan: https://www.esperanto.de/eo/eeu2024-aligho

Multaj informoj ĉe: http://kongreso2024.esperanto-france.org

Por ĉiuj demandoj, vi povas skribi al kongreso2024@gmail.com



# Eŭropa Esperanto-Kongreso

**Strasburgo, Francio – de la 8a ĝis la 12a de majo 2024**

## La programo

**1 Kulturo**

Esperanto-kongresoj ĉiam inkluzivas bonkvalitan kulturan dimension. Koncertoj kaj spektakloj, kantistoj kaj grupoj el pluraj eksterlandoj estos ofertitaj. Diversaj konferencoj en Esperanto estos organizitaj pri diversaj temoj krom lingvaj temoj. Ankaŭ estos starigitaj librovendejaj servoj kaj libroprezentaj kunsidoj de iliaj aŭtoroj estos organizitaj en malsamaj tempoj dum la kongreso.

**2 Turismo**

Nia kongreso okazos en majo 2024, tio estas ekster la plej okupataj periodoj kaj ebligos al vi malkovri la urbon en pli trankvila etoso. Krom la tradiciaj turismaj vizitoj tage kaj nokte planitaj, okazos vizitoj per riverboatoj, temaj promenoj kaj planitaj postkongreso ekskursaj tagoj en Colmar, Haut-Koenigsbourg, Obernai kan Mont-Sainte-Odile.

**3 Gastronomio**

La reputacio de la alzaca gastronomio estas fama kaj ĝia tipeco estos reliefigita per la invito de kongresanoj al inaŭgura bufedo komponita el lokaj produktaĵoj, ĉefe ekologi-kongruaj kaj laŭsezonaj. Ankaŭ ekzistas nutraĵoprovizisto en Strasburgo, kies nomo eĉ estas en Esperanto, t.e. “kuirado”. Gustumoj de alzacaj bieroj kaj vinoj ankaŭ estos proponataj.

**4 Laborsesioj**

La diversaj asocioj organizos sian ĝeneralan asembleon, siajn estrarkunsidojn kaj ankaŭ laborkunsidojn.

**5 Lingvoinstruado**

Esperanto-kursoj kaj preparsesioj estos ofertitaj al partoprenantoj, depende de ilia lingvonivelo, precipe laŭ la eŭropa referenca kadro por lingvoj disvolvata de la Konsilio de Eŭropo.

**6 Malfermo al la ĝenerala publiko**

Esperanto estas lingvo malfermita al la mondo, do iuj programeroj de tiu ĉi kongreso estos malfermitaj al la ĝenerala publiko. Prezentaj kunsidoj kaj rapidkursoj por komencantoj estos ofertitaj plurfoje dum la kongreso. ◄

*Bruno Flochon, Prezidanto de la Organiza Komitato, Prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto*

# Kalendaro

**Kopenhago**

- La 5-a de februaro, je la 19-horo: Babila Vespero
- La 19-a de februaro, je la 19-horo: Ĉina Novjaro
- La 4-a de februaro, ja la 19-horo: Esperanto Lundo

**Tago de la Gepatra Lingvo**

- La 21-a de februaro 2024

**Generala kunveno de KEK**

- 18-a marto je la 19a horo, Carit Etlars Vej 6, 1814 Frederiksberg C

**Jarkunveno de DEA 2024**

- 6-a de aprilo, Danhostel Ishøj Strad, Ishøj Strandvej 13, 2635 Ishøj

**Artikoloj por la venonta eldono**

- 1-a de majo

**Eŭropa Esperanto-Kongreso**

- 8-a de 12-a de majo 2024, Strasburgo, Francio

**Universala Kongreso**

- 3-a de 10-a de aŭgusto 2024, Aruŝo, Tanzanio

Esperantoforeningen for Danmark
Dana Esperanto-Asocio / DEA

# JARKUNVENO de DEA 2024

# 6-an de aprilo

# en Danhostel Ishøj Strand

# Ishøj Strandvej 13

# 2635 Ishøj

**Programo**

## Sabate la 6-an de aprilo

12.00 Lunĉo

13.00 Prelego de Jacob Norfalk:
Esperanto kaj la Roskilde Festivalo

14.30 Kafo

15.00 Ĝenerala Kunveno de DEA.

17.00 Foriro.

**Pri la prelego**

Dum la pasintaj 15 jaroj estis kunlaboro inter Roskilde
Festivalo kaj DEJO.

Ĉiujare ĉirkaŭ 50 volontuloj laboras per Esperanto kaj
En Esperanto kunlabore kun la festivalo. La grupo (esperantoholdet) estas tre estimata de la festivalo kaj
Povas pli-malpli mem elekti kiun taskon ĝi faras.

La pasintaj 5 jaroj ni gardis grandan enirejon proksime al la plej fama Oranĝa scenejo de la festivalo.

Ni laboras, kuiras, loĝas (kaj festas) kune, la partoprenantoj ĝuas senpagan partoprenon, loĝadon, manĝadon, drinkadon, koncertojn kaj amuziĝon, kaj eĉ povas gajni monon dume, se ili volas.

Mi ankaŭ parolos iomete pri
-la historio – antaŭe ni havis aliajn taskojn, ekzemple la manĝobudon "Glad esperanto-Mad"
-la specialaj defioj de uzi Esperanton kiel laborlingvo en la reala vivo, kaj kiel ni solvis ilin
-la financoj kaj nia subteno de palestinaj viktimoj kaj ukrainaj esperantistoj.

Vidu https://roskildefestivalo.wordpress.com/

**Ĝenerala kunveno de Dana Esperanto-Asocio 2024**

**Provizora tagordo, sabate la 4-an de marto**

1. Elekto de kunvena gvidanto
2. Elekto de protokolanto
3. Jara raporto
4. Jara kalkulaĵo de 2023
5. Laborplano de DEA 2024
6. Envenintaj proponoj
7. Elekto de prezidanto
8. Elekto de estraranoj kaj anstataŭantoj
9. Elekto de revizoroj
10. Eventualaĵoj

Praktikaj informoj: Piedire de la S- stacidomo de Ishøj.
Buse: numero 301.
Aŭtomobile: senpaga granda parkejo.

**DEA kore invitas ĉiujn membrojn - aparte bonvenigas gastojn el niaj najbaraj landoj.**

**Mendoj kaj prezo: 575 kr.**

**Aliĝu rete al: peter@wraae.dk antaŭ la 25-an de aprilo 2024**

Via aliĝo ekvalidos nur **per antaŭpago de la sumo, al konto reg.8411, konto 4188386, ĉe Fælleskassen.**

La restado inkludas:
Tuttagan kafo kaj fruktoj, lunĉo kaj 1 akvo. ◄

# KEK iam havis propran ejon

Por la nostalgia temo en la klubo mi ekhavis la ideon pri tiu ĉi alineo el miaj memoroj. Ĉio estas laŭ mia aktuala memoro. KEK iam havis propran kunvenejon. Mi prezentas la tempon antaŭ, dum kaj post tiu stato.

Bodil kaj Gustav Kühlmann dum jardekoj estris la kopenhagan klubon, KEK. Ili bone kunlaboris. Estis afero, en kio tio tamen ne plene funkciis. Gustav revis pri nia propra ejo. Bodil ne. Ambaŭ havis ĉiu siajn apogantojn. Kelkaj donacis monsumojn por la celo.Finfine la estraro komencis per starigi la fonduson, Esperanto-Domo.

KEK kunvenis dum jaroj en diversaj kulturdomoj. Mi memoras la lastan en H.C.Ørstedvej, antaŭ ol ni havis nian propran lokon en Rosenørns Allé. Gustav dum monatoj laboris tie por pretigi ĝin por kunvenoj. Estis granda ĉambro, kuirejo, necesejo kaj ĉambreto.

Post kelkaj jaroj Kühlmann retiriĝis. El la restantoj ili preferis min kiel prezidanto.

Nun mi ordigis la tablon kun tasoj kaj teleroj. Malmultaj vizitis la klubon. Jen malagrabla memoro.

Nia biblioteko nun situis en la ĉrambreto, temis pri du grandaj ŝrankoj. Post kelkaj jaroj Gustav kaj nia kasisto interkonsentis provi vendi nian propran ejon. Bodil jam estis dirinta al mi, ke Gustav ne plu estis la sama. La klubo ankoraŭfoje vagadis, ni havis lokon en kelo ĉe Ole Blaust, jen en iu kulturdomo. Dume la fervojistoj invitis nin kunveni ĉe ili. DSB prizorgis lokon por la ŝatokupoj de iliaj kunlaborantoj.

La du ŝrankoj nun estis translokigitaj al simpla ĉambro en la urbo. Ĝin prizorgis Ole Blaust kontraŭ monata pago. Sed nia ĝeneralkunveno ne povis aprobi tian elspezon. Ni tial decidis, ke unu ŝranko devis al Betty en Vallensbæk kaj la alia al mi en Værløse, ĉar ni havis la lokon. - Por tiu servo ni mendis Jens Stengård Larsen kaj Kim Henriksen. Ili luis vagonon kaj transportis la bibliotekon al unue norde de Kopenhago kaj poste al la suda parto.

Ĉe mi la ligna memfarita ŝranko ne plu ekzistas. La estraro unue vizitis min por kontroli la enhavon. Mi povis forĵeti grandan parton. Ion mi gardis. Mi kolektis stokon je grandeco de pli ol kuba metro en sakoj kaj kestoj, pretaj por nia prezidanto. Li vizitos min. ◄

*Jytte Sunekær*

# Filozofia posteno

Kaj la amo estas senmorta
Kaj la morto nur horizonto
Kaj la horizonto nur estas limo
Por nia rigardo

*Nekonata germana poeto*

**Pensoj**

”Estas tre malagrabla la ĉeesto de iu, kiu ĉiam plendas, vidante difektojn en ĉio”

Ni ĉiuj havas diversajn, personajn limojn. Homoj, kiuj nur plendas pro ĉio,laŭ mi, estas neeltaneblaj. Mia pacienco malaperas tute simple!

Se oni vere strebas helpi, kaj la “ricevanto” daŭre lamentas, do mia solvo estas rezigni.

Tamen mi konfesas, ke mi sentas min seniluziigata kaj iomete kolera.

Mi ŝatus helpi, kaj kiam tiu ne eblas, mi ne eltenas tiun vidpunkton de negativeco.

La homo estas kompatinda, sed mi ne estas psikologo aŭ psikiatro kaj mi preferas distancigi min. ◄

# Toki Pona

## Simpla Lingvo

*Logo de Toki Pona*

Toki Pona staras kiel unika esperimento en la lingva mondo, kreita de la artisto kaj lingvisto Sonja E. Kisa komence de la 21-a jarcento. Simile al Esperanto, ĝi estas konstruita lingvo kun misio disrompi kulturajn limojn kaj krei konektojn en kompleksa mondo.

La celo estas simpla: esprimi kompleksajn pensojn kaj ideojn kun minimuma peno. Tio, kio igas la lingvon aparta, estas ĝia limigita vortprovizo ĉirkaŭ 120 vortoj, kaj simpla gramatiko.

La celo de Toki Pona etendiĝas preter esti nur lingvo; ĝi estas ideologio, kiu instigas pozitivan interagadon kaj klaran komunikadon. La lingvo vekis intereson je globa nivelo kaj kunligas homojn el diversaj kulturoj, kreante platformon por kompreno trans limoj. La popularo de Toki Pona kreskas, kiel pli da partoprenantoj adoptas la ideon de minimalisma komunikado.

Toki Pona estas pli ol simple lingvo; ĝi estas movado al simplikeco kaj pozitiva interago. ◄

*Jens-Peter R. Paulsen*

# La Afrika kontinento

**Preparo por la Universala Kongreso**

La historio kaj kulturo de Afriko etendiĝas malproksime en la tempo. Orienta Afriko estas rekonita kiel la origino de la homaro. Afriko etendiĝas geografie de la norda temperita zono, super la tropika kaj en la suda temperita zono. La kontinento estas 20% de la tera areo kaj estas hejmo de pli ol 1,4 miliardoj da homoj.

**La kontinento tra la tempo**

En la pasinteco, la klimato estis tre malsama. Oni trovis kavernajn pentraĵojn de 3500 ĝis 2500 a.K. montrante florojn kaj abundan faŭnon kie hodiaŭ estas dezerto. Arkeologio montras ke de ĉirkaŭ 7000 a.K. ŝafoj, kaproj kaj pli grandaj setlejoj kun ceramiko estis ĝeneraligitaj.
De la 8-a jarcento ĝis la 17-a jarcento, la komercvojoj estis okupataj. Oro, salo, spicoj, tritiko, eburo kaj sklavoj estis venditaj de Okcidentafriko kaj Mezafriko ĝis Mediteranea Maro.
Per komerco, la religio de Islamo disvastiĝis. Ofta religio kun komunaj reguloj faris komercon pli sekura kaj eĉ pli granda tra la kontinento.
La koloniigo de Afriko fare de la eŭropaj imperioj fine de la 19-a jarcento ĝis la unua mondmilito influis la sendependecon kaj historion de la landoj ĝis la nuntempo.

**Mallongaj faktoj**

Ĉirkaŭ 2000 malsamaj lingvoj estas parolataj sur la kontinento. Afrikaj lingvoj estas dividitaj en kvin grupojn: afroaziaj lingvoj, nilo-saharaj lingvoj, niger-kordofranaj lingvoj, ĥoisaj lingvoj kaj aŭstroneziaj lingvoj.
La plej granda urbo de la afrika kontinento estas Lagoso en Niĝerio kun 9 milionoj da loĝantoj. ◄



*Louise Wangberg*

# Pri Tanzanio



**Preparo por la Universala Kongreso**

Tanzanio estas la unuigita nomo por la antaŭa Sultanlando de Zanzibaro kaj kontinenta Tanganjiko kaj estis unuigita en 1964. Ampleksaj ŝtatigoj tra la Aruŝo Deklaracio de 1964 kaj militoj donis al Tanzanio defiitan pasintecon. Kun la unua libera prezidant-elekto en 1995, la ekonomia situacio komencis turniĝi. Plej multaj vojaĝoj en Tanzanio komenciĝas en Asuŝo, kiu estas centro por komerco.

Rimarkindaj altiroj inkludas la Serengeti kaj Olduvai Gorĝon. La Serengeti estas grandega natura areo kiu etendiĝas inter Tanzanio kaj Kenjo ĉe Viktoria Lago. La Olduvai gorĝo ankaŭ estas nomita la lulilo de homo. Tra multaj elfosadoj, fosiliaj restaĵoj de kvin malsamaj homsimioj kaj fruaj homoj estis trovitaj. De Australopheticus Robustus ĝis Homo Sapiens. Ekzistas ankaŭ sufiĉe da kavernpentraĵoj en Tanzanio, kiuj estis malkovritaj precipe en 2018. Multaj el la kavernoj situas en la teritorio de la Sandawe-popolo.
Estas pluvsezono de aprilo ĝis majo. Ĝi povas fermi kelkajn parkojn, sed fari la tutan landon pli abunda. La averaĝa temperaturo estas de 22-28 gradoj.

Estas sufiĉe certe, ke vi ricevos muzikon sub via haŭto dum via vizito al Tanzanio. Vi povas aŭskulti la ritmon de la svahila kanto Jambo pri Kilemanĝaro, kiu estas ofte uzata kiel bonvena kanto, aŭ Malaika, kiu estas precipe rilata al Tanzanio kaj Kenjo.
Rimarkindaj inventoj kaj entreprenistoj de Afriko inkludas: Arthur Zang, kiu inventis la Cardiopad, kiu ebligas korkirurgion ekstere kaj rete. Shiani Siroya inventis kaj estas la direktoro de Tala, kiu ekfunkciigas la ekonomion per mikropruntoj. Faraja Nyalandu komencis Shule Direct, kiu donas al infanoj kaj instruistoj aliron al cifereca instrumaterialo kaj tiamaniere altigas la eduknivelon en la tuta lando, ankaŭ en maldense loĝataj lokoj. ◄

*Louise Wangberg*

# Preparoj pri la venonta Universala Kongreso en Aruŝo, Tanzanio

La 109-a UK mem okazos sub la temo “Homo, lingvo kaj medio por pli bona mondo” en Aruŝo, Tanzanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 2024. Ankoraŭ eblas aliĝi per https://uk.esperanto.net/2024/




31 geesperantistaj aktivuloj de Tanzanio, Burundo, Kenjo, DR Kongo kaj Germanio lertiĝis, sub respektivaj gvidoj i.a. de Francesco Maurelli, Jérémie Sabiyumva, Maria Rosaria Spano kaj Costantine S. Mashauri pri kongres-organizado, informado, interpretado, turisma gvidado, teama laboro, merkatiko, krom per prelegoj kaj aktivaĵoj celante prepariĝi por la 109-a UK, en seminario ĉe la Aruŝa Internacia Konferenca Centro (AICC) de la 5-a ĝis la 7-a de januaro 2024.

Ĉiuj enplektitaj partioj en la preparlaboroj de la unua UK en Afriko pli ol neniam antaŭe elturniĝas laŭ siaj ebloj por la rapida pretigo de la aferoj, ke la potencialaj partoprenantoj de la kongreso povu kiel eble plej baldaŭ aliri al la informoj pri kostoj, priskriboj, datoj, partoprenkondiĉoj ktp de la dumkongresaj ekskursoj, antaŭ- kaj postkongresaj programoj. Same, al la informoj pri la loĝkostoj, servoj, distancoj, hoteloj, gastejoj rezervitaj por la kongreso, kaj al aliaj gravaj sciigoj en ligo kun la kongreso. Ĉiuj strebas plenigi la truojn tiel ke la afero povu marŝi plibone. ◄

*Adjévi Adjé*

# Krei enhavon por Esperanto

Karaj esperantistoj de Danlando.

**Helpi krei enhavon en Esperanto**

Antaŭ kelkaj semajnoj mi havis la okazon viziti Ĉinion kaj konatiĝi kun la laboro de Ĉina Radio Internacia, kiu daŭre produktas programojn en Esperanto.

Aŭskultu Esperanton ĉe la radiostacio Ĉin-Esperanto-Asocio ĉi tie:
https://esperanto.cri.cn kaj https://www.facebook.com/criesperanto/

La diversaj internaciaj elsendoj estas ĉiam pli integritaj, kaj la Esperanto-fako kontribuos per provizo de materialoj el landoj por kiuj la internacia fako provizas programojn. Helpos al la Esperanto-fako daŭrigi sian laboron se kontribuos esperantistoj el tiuj landoj.

Se vi havas intereson kunlabori por programoj en Esperanto aŭ en la dana lingvo, aŭ konas aliajn esperantistojn, aparte junajn, kiuj povus ekzemple prepari videomaterialon, bonvolu mallonge respondi al mi kaj mi informos al ĈRI ke ili povos vin kontakti.

Kontaktu: criselena@163.com

ĈRI nun preparas videojn por la nova jaro en la ĉina kalendaro, "jaro de drako". La videoj estu de "drako-danco" antaŭ lokaj konataj vidindaĵoj por celebri la novjaran feston, kaj povas esti individuaj aŭ kolektivaj.

Spektu la videojn de Ĉina Radio Internacia pri drako-dancado lige kun la ĉina novjara festo ĉi tie:
https://www.facebook.com/100064783899911/videos/262598533313235

Ni elkore dankas vian konsideron, ĉar tia kunlaboro povas montri ne nur la valoron de Esperanto mem kaj niaj asocioj por internacia komunikado, sed nia deziro kontribui al disvastigo de la kultura diverseco en nia mondo. Por komuniki pri tiu projekto mi dankas la kunlaboron de mia Estrara kolegino Aurora Bute. ◄

*Duncan Charters*, *Prezidanto UEA*

# Internacia Tago de la Gepatra Lingvo

**La 21-a de februaro 2024**

Dum tiu tago, la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo, ni antaŭenigas la gravecon de lingva diverseco kaj multlingva edukado. Lingvaj rajtoj estas fundamento por justaj kaj daŭripovaj socioj, ĉar lingvoj estas ĉe la koro de nia ĉiutaga vivo, identeco, kultura heredaĵo kaj komunuma unuiĝo. Lingvoj estas bazo por aliri ĉiujn aliajn homajn rajtojn.

Protekto kaj antaŭenigo de lingvoj gravegas, ĉar estas pere de lingvoj ke oni transdonas mondrigardojn kaj konservas lokajn kaj tradiciajn sciojn kaj kulturojn. Bedaŭrinde, laŭ Unesko, 40 procentoj de la monda loĝantaro ne havas aliron al edukado en lingvo, kiun ili parolas aŭ komprenas. Samtempe, pli kaj pli da lingvoj malaperas.

En niaj pli kaj pli plurecaj socioj, kaj antaŭ la ideo de tutmonda socio kiu inkluzivas la tutan homaron, la demando pri lingvoj fariĝas nepra prioritato. Fakte, lingvoj estas la absoluta fundamento de kompreniĝo kaj kunlaboro. Tiel, lingvaj rajtoj rilatas rekte al demokratio kaj vera komuna decidado pri komunaj problemoj.

Ni antaŭenigu la valorojn de multlingva mondo proponitajn de Unesko: instruado en gepatraj lingvoj, multlingva edukado en ĉiuj niveloj, kaj interkultura edukado. Tiel, ni esperas, ke paco, evoluigo kaj homaj rajtoj fariĝos realaĵo por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Per lingvoj ni kundividas nian homecon. Ni uzu kaj antaŭenigu ĉiujn lingvojn, inkluzive la internacian lingvon Esperanto, por realigi tiujn principojn kaj valorojn. Por festi la solidarecon inter homoj de malsamaj devenoj, ni ankaŭ invitas homojn de bona volo al la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Arusô, Tanzanio, inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 2024. ◄

*Universala Esperanto Asocio*

# La papirusoj de Herculaneum

La papirusoj de Herculaneum estas pli ol 1,800 papirusaĵoj malkovritaj en la 18-a jarcento en la Vilo de la Papiroj en Herculaneum. Ili estis karbonizitaj kiam la vilo estis englutita de la elerpiĝo de Monto Vesuvio. Ekde tiam, oni konsideris ilin nelegeblaj, ĝis nun.

La papirusoj enhavas plurajn tekstojn kaj venas el la sola konservita biblioteko el antikveco kiu ekzistas tute. Tamen, la legado de la ruloj estas ekstreme malfacila kaj povas riski ilian detruon. La plej unika trajto de la Biblioteko de Herculaneum estas ke multaj el la konservitaj tekstoj estas tute nekonataj el aliaj fontoj.

**De antikveco ĝis la nuntempo - 3D-skanado**
Brent Seales, profesoro pri komputiko ĉe la Universitato de Kentukio, sukcese malkovris la enhavon de rulo en marto 2023. Seales uzis 3D-radiajn bildojn kaj komputilan programon (kiu montriĝis esti la ŝlosilo por malfermi la rulojn) por sukcese elpreni literojn kaj simbolojn el radiobildoj de la malspiralitaj papirusoj.

Seales kredas, ke legi la tutan kolekton de Herculaneum-roluloj estas ne nur ebla, sed estos la plej granda malkovro el la antikva mondo ĝis nun. ◄

*Jens-Peter R. Paulsen*



*Unu de la Herculaneum-rolul*oj

# Ĉina Novjaro


### La jaro de la ĉina drako

Ĉina novjaro estas festeta de ĉirkaŭ 2 miliardoj homoj kaj estas la plej granda amasa migrado al evento. En la 2024 estas la jaro de la drako [lóng] kaj la jaro komenciĝas je la 10-a februaro.
La drako staras por fiero, potenco kaj granda feliĉo same kiel persona fiero kaj malpacienco. La merkato en Ĉinio estas forte influita de la kredo de publiko je astrologio, kaj kartoj, totemoj kaj akcioj kun drakoj aŭ aludoj al drakoj estas fervore komercitaj.


Se oni volas celebri la jaron de la drako laŭ la ĉina kalendaro per bildoj de tiu fantazia besto en la okcidenta kulturo, surface oni trovas tute alian de la ofte bonvola nobla ĉina drako ludanta tra la la nuboj kaj ligita al pluvo kaj akvo. La mezepoka okcidenta drako kraĉas fajron kaj faligas birdojn el la ĉielo per sia fetora spiro. Ĝiaj nehaltigeblaj voremo, vantemo kaj ruzo simbolis la diablon. Se liberiĝo el religiaj tenebroj okazis en la Renesanco, tio estis dank'al la plezuro de fantazio.
Ekzemple, la interesa pentraĵo "Cadmus and Harmonia" (Kadmo kaj Harmonio, 1877) de la angla feminisma pentristino Evelyn De Morgan (1855-1919), konservita en Wolverhampton en Britio, montras lin kiel serpenton volvitan al la nuda korpo de sia edzino Hamonio. Kadmo, etimologie la "Orientulo", kiu portis al antikva Grekio civilizacion kaj la arton ruĝe kolorigi teksaĵojn (ebla originon de "fenicia" kaj rilataj vortoj), neniam perdis tiun rilaton kun la religio de tera fekundeco. Espereble, do, ankaŭ tiu ĉi jaro de la drako portos al ni progresojn en novaj teknikologioj kaj internaciaj kunlaboroj, sen perdi la rilaton kun la naturo, kiun la helena drako-serpento tiel bone reprezentis. ◄

*Allesandra Madella, Ĉina Esperanto-klubo*



# Azenaj Oreloj




1 granda apuda termaso

2 ĉielo korpo

3 mezurunuo

4 maniero lerni

5 tempoperiodo

6 la dua plej
granda kontinento

7 kunveno





Pri la zamenhof festo en Kopenhago

Ĉe la Zamenhof kunveno, okazinta en decembro, ni ĝuis nin. Ni kantis la Esperantan himnon kaj kristnaskajn kantojn en Esperanto kun bona muziko. Ni parolis pri multaj aferoj de permakulturo ĝis manĝreceptoj dum ni manĝis kristnaskajn kukojn kaj trinkis teon kaj kafon. ◄



